

TERMINOTEKO

Informilo pri terminara laboro en Esperanto en kunlaboro kun

Perkomputora Termino-Kolekto (Pekoteko)

aperas laŭbezone; represo kaj diskonigo de la informoj estas dezirata

Redaktanto: Bernhard Pabst, Südweg 42, D-53773 Hennef
Germanujo
Tel. ..49-22.42-86.65.80

Cirkulero n-ro 11 (5a jaro, 1/1995)

«95-09-01»

Estimata sinjorino,
estimata sinjoro, karaj geamikoj,

centra temo de tiu ĉi cirkulero estas terminara bibliografio. Ni iom prilumas, kie oni trovas la kelkfoje sufiĉe kaŝitajn informojn pri la multaj, sed ofte ne facile akireblaj terminar(et)oj, kiuj karakterizas la Esperantan terminologion. Speciala atento ricevas per komputoro legeblaj bibliografioj, kiuj feliĉe ankaŭ jam ekzistas en nia lingvo.

Kuntekste kun la temo ni preparis indekson de la Terminoteko-cirkuleroj 1 ĝis 10 kaj publikigas listojn de haveblaj elektronikaj tekstoj, precipe de terminaroj, ĉu verkitaĵ en la kadro de Pekoteko, ĉu ekster ĝi.

La okupo pri nia propra informilo instigis nin iom pli detale ol kutime raporti pri ĝi mem kaj kvazaŭ resumi nian - kaj do precipe vian - laboron, kiel ĝi speguliĝas en la unuaj dek kajeroj.

Pro la kreskantaj kostoj de Terminoteko ni devas kontroli la liston de ricevantoj. Tiujn inter vi, kiuj jam ne plu reagis al ckl. 9 aŭ 10, ni petas, sendi kelkajn liniojn pri via terminara laboro aŭ simple poŝtkarton kun indiko pri daŭra intereso.

Antaŭdanke pro viaj reagoj
Kun afablaj salutoj

[*aŭtografo de Bernhard Pabst*]

Se iu planas ekverki terminaron, la unua demando devus esti "kio jam ekzistas?". Por serioze respondi tiun demandon li aŭ ŝi bezonas bibliografion, trovlibron pri aliaj libroj. En multaj ŝtatoj "nacia biblioteko" eldonas "nacian bibliografion" registrante ĉiujn librojn publikigitajn sur la propra teritorio aŭ en la propra lingvo. En Esperantujo la situacio estas malpli favora. Indikojn pri malnovaj libroj ni trovas relative facila en «Bibliografio de Internacia Lingvo» <BIL> de Stojan el la jaro 1929, represita 1973. Pro ĝia relativa kompleteco ĝi ankoraŭ hodiaŭ estas fundamenta konsultverko.

Por la jaroj post 1929 mankas kompleta bibliografio de Esperanto-libroj. Oni devas helpi sin per la katalogoj de interlingvistikaĵoj de kelkaj grandaj bibliotekoj, ekz. de Vieno, Amsterdamo, *Saarbrücken*, Lublino, Oregono, aŭ de aro da bibliografioj pri specialaj temoj, ekz. "naciaj" Esperanto-Bibliografioj (Ĉeĥa, Jugoslava, Nederlanda, Pola ..), "fakaj" (terminaroj kemiaj aŭ matematikaj, ktp.) aŭ "gazetaj", ekz. la «Katalogo de la Esperanto-Gazetaro» de Takács (1934) aŭ la «Inventaro de Planlingvistikaj

Periodaĵoj» de Rondo Takács (1992). Speciale grava por terminaristoj estas la «Bibliografio de Vortaroj», kompilita de Edward Ockey, Banstead 1982 kaj la - pardonu la plataĵon- librokatalogo de UEA. Bibliografioj de elektitaj verkoj ankaŭ troviĝas en kelkaj enkondukaj aŭ konsultaj verkoj kiel ekz. «Esperanto en Perspektivo» <EeP> (Lapenna k.a. 1974), «Plansprachen» (Haupenthal 1976), «Internationale Plansprachen» (Blanke 1985), k.a. Do jam nur tiu tute nekompleta unua bildeto montras, kiel dise informoj troviĝas kaj kiel malfacile estas ekhavi ilin. Pro tio eĉ jam ekzistas "bibliografio de bibliografioj" en «Biblioteka manlibro» de Herbert März, Aarhus/Wien 1979.

Ankoraŭ malpli facila la afero fariĝas, se ni ne serĉas "bibliografian unuon", do precipe libron, sed artikolon en revuo, kontribuon en periodaĵo. Ankaŭ Sur tiu kampo jam ekzistas bibliografioj, ĉu fakaj, ekz. pri la enhavo de Scienca Revuo 1949-82 de *Irena Bednarz* (1984), ĉu pri personoj, ekz. pri *Haupenthal*, *Waringhien*, *Wüster* k.a.

Precipe grava por terminaraj problemoj estas la bibliografio de (plejparte) artikoloj en «Fokuso, Interlingvistika Cirkulero». Inter 1967 kaj 1976 ape-

ris 14 numeroj eldonitaj de doktoro *Ebbe Vilborg*, *Göteborg*, Svedujo (pri li vd. ckl.10, p. 24-25). «Fokuso» enhavas apud artikoloj 1303 bibliografiajn erojn ordigitajn laŭ la rubrikoj «ĝenerala kaj kompara interlingvistiko», «Esperanto», «Ido», «Interlingua», «Interlingue» kaj «ceteraj projektoj». La tajpita kaj multobligita folio de «Fokuso» jam delonge estas elĉerpita kaj hodiaŭ nur pene akireblaj.

Kun la afabla permeso de doktoro *Vilborg* ni pro tio komencis ekklavi lian interlingvistikan bibliografion per data-baza programo por IBM-kongruaj komputoroj. Tiel lia valora laboro denove estas havebla por granda publiko kaj malmultkoste akirebla sur komputora disketo. Pro la nuna elektronika vesto ĝi krome estas pli vaste uzebla, ĉar kiel kutime en datum-bazoj oni povas facile serĉi laŭ multaj diversaj kriterioj kiel aŭtoro, titolo, fako, periodo, jaro ktp., dum la nura intersekvo en la originala tajpita versio estas laŭ (duon-)jaroj kaj interne de la (duon-)jarkolektoj alfabete laŭ aŭtoroj.

En unua paŝo ni nur registris la bibliografiajn erojn de la rubrikoj «ĝenerala kaj kompara interlingvistiko» kaj «Esperanto», preterlasante la aliajn planlingvojn. En la intersekvo de la

transprenitaj ordo-numeroj de «Fokuso» (0001-1303) do nun ankoraŭ estas "truoj", kiel oni tuj konstato, ordonante al la komputoro ordigon laŭ numeroj. Por pleje eluzi la eblecojn de aŭtomata serĉado krome necesis registri ĉiun bibliografian eron aparte. Dum en la originala «Fokuso» ekz. recenzoj aperas sub la sama numero kiel tiu de la recenzita verko, ni disigis ilin, aldonante subnumerojn disigitajn per streketoj al la ordo-numeroj de «Fokuso» (kp. ekz. 0142-nn).

Plia diferenco estas, ke ni ne registris la (relative malmultajn) interlingvistikajn monografiojn troveblajn en «Fokuso», ĉar ili bezonas alian datum-bazan "maskon" aŭ kadron. Krome multaj el ili estas troveblaj en aliaj elektronikaj bibliografioj, precipe en la «Katalogo de Germana Esperanto-Biblioteko» kun pli ol 12.000 eroj (stato 05-1994; 3,5-cola disketo en DOS ĉe GEB, Gmünder Str. 9, D-73430 Aalen, Germanujo kontraŭ 15,- DM plus afranko) kaj la «Katalogo de Hispana Esperanto-Muzeo (str. Zamenhof 12, E-08739 Sant Pau d'Ordal, Hispanujo) aŭ (parte) en la «Katalogo de la Esperanto-Biblioteko de Bernhard Pabst» (ĉ. 1300 eroj, havebla de la aŭtoro).

Plia celo de la nuna registraĵo estas kreo de kerno de elektronika bibliografio de interlingvistikaj artikoloj. Pro tio ni jam komencis aldoni pliajn kontribuojn, precipe la artikolojn (re-)publikigitajn en Akademias Studoj 1983-1990 (haveblaj de Rüdiger Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado, KOL 1BO). Tio ĝis nun okazis tamen nur sporade kaj hazarde (kp. la ordo-numerojn 1304ss). Ĉiuj interesitoj estas petataj aldoni pliajn erojn laŭ la nuna skemo por ekhavi laŭeble kompletan bibliografion.

Por havigi impreson de la elektronika bibliografio ni aldonas specimenajn enskribaĵojn kaj jenajn ekzemplajn listojn:

- listo de kontribuoj pri la «Eŭropeco» de Esperanto
- listo de la diskuto pri la ĝusta Esperantigo de la Angla termino «computer»

Pro aldonoj, atentigoj kaj korektoj ni dankas.

La listo de artikoloj pri «Eŭropeco» de Esperanto estas farita ordoninte al la komputero «serĉu je "Eŭrop" en la temokampo kaj ordigu laŭ jaroj kaj interne de jaroj laŭ aŭtoroj». La kampo-nomojn ni ne printigis. Ili estas

<u>ĵaro</u>	ordo-numero
aŭtoro	
titolo	
subtitolo	
temo	
fonto	
rimarkoj	

Komprenble eblas ĉiu alia listigo aŭ ordigo, ekz. laŭ aŭtoroj aŭ fontoj. Tiuj lastaj estas mallongigitaj, do ekz. HDE = Heroldo de Esperanto, BrE = Brita Esperantisto, Oomo = Oomoto ktp.

1) 1967 0164
Iĉiro Tarao.

Ne forgesu, ke ekzistas multe da aliaj rasoj krom Eŭropaj kaj Amerikaj neologismoj; Eŭropeco.
HDE 1967/9, p.4
Pledas por aŭtonomaj vortoj anstataŭ neologismoj.

2) 1969 0576
Sonnenfeld, E.

Ĉu Eo estas eŭropa lingvo?
Eŭropeco
Oomo 1969/3p.48
La gramatiko de Eo neniel eŭropa pro aglutineco kaj skemeco. Resumo en IIS 1969/3, p.38 (A.B.).

3) 1969 0581

Verloren van Themaat, W.A.
La Eŭropa karaktero de Eo
Eŭropeco
KEG 1969/11, p.137
Kp. 0576

4) 1969 0576a

A.B. [= Bormann, Artur]
[Resumo de Sonnenfeld, E. Ĉu Eo estas eŭropa lingvo? Vd. 0576]
Eŭropeco
IIS 1969/3, p.38

5) <u>1975</u>	1800
Trunte, Hartmut Esperanto ĉu eŭropa lingvo? Eŭropeco Kontakto 1975 (48), p.15	
6) <u>1977</u>	1828
Vandel, Amri Ĉu Esperanto estas Eŭropa lingvo? Eŭropeco IsrE 1977 (60), p.5 Defendas "Eŭropan" vortaron	
7) <u>1978</u>	1447
Golden, Bernard Esperanto kaj eŭropaj kutimoj: la problemo de virinaj titoloj Omo 1978 7p.103	
8) <u>1993</u>	1399
Yamasaki, Seikō Esperanto estas eŭropa lingvo Eŭropeco REo 1993/7p.130	

Kaj jen la (surprize longa) listo de artikoloj, kiu okupiĝas nur pri la ĝusta Esperantigo de la Angla vorto «computer». Bv. ankaŭ noti, ke tiu diskuto jam komencis fine de la 60aj jaroj! Do pri la hodiaŭaj diskutoj nur eblas diri: Nenio nova sub la suno. Probable nenio alia unuopa vorto ricevis tiom da atento flanke de niaj terminaristoj.

Kiel oni vidas, la listo enhavas nur la indikojn pri jaro, aŭtoro, titolo, fonto kaj ordo-numero, dum mankas la indikoj pri subtitolo, temo kaj rimarkoj. Bedaŭrinde pro la mallarĝeco de la formato A5 de Terminoteko ne eblas redoni ĝin en la multe pli superrigardebla origi-

nalo, kiel ĝin produktas la programo.

1967

- Albault, A. Pri elektronaj "cerboj" HDE 1967/18, p.4 0205
- Wells, J.C. Pri la termino «ordinato» HDE 1967/18, p.4 0254

1968

- Albault, A. Kiel diri "computer"? BrE 743, p.317 (1968) 0291
- Atkinson, W.G. Kiel diri "computer"? BrE 744, p.340 (1968) 0298
- Booth, N. Novaj teknikaĵoj BrE 743, p.319 (1968) 0301
- Briscoe, J.A. "Computer" BrE 743, p.318 (1968) 0303
- Clissold, P. Novaj teknikaĵoj BrE 744, p.340 (1968) 0306
- Eichholz, Rüdiger. Kiel diri «computer»? BrE 745, p.360 (1968) 0313
- Milton, R.J. Komputilo, komputero, ordinatoro, pensmaŝino HDE 1968/3, p.3 0335
- Palmer, H.D. Mi timas neologismojn BrE 743, p.318(1968) 0339
- Penny, E.R. "Komputilo" BrE 744, p.340 (1968) 0340
- Sykes, J. Kalkulatoro? BrE 743, p.318 (1968) 0354
- Sykes, J. «Ordinatoro» aŭ «Komputero»? HDE 1968/3, p.4 0355
- Vogelmann, Bruno Sufikso -ero nur por eroj HDE 1968/2, p.3 0358
- Wells, J.C. Kiel diri "computer"? BrE 741, p.260 261 (1968) 0362

1983

- Eichholz, Rüdiger. Ĉu oni uzu "komputilo", "komputoro" aŭ "komputero"? AkSt 1983, p.146 1465
- Münnich, A. Pri kelkaj bazaj terminoj de komputado - AkSt 1983, p.162 1472

1985

- Bujdosó, I. Perkomputila kontrolo de terminaroj AkSt 1985, p.101; Budapeŝta Informilo 1543

1986

- Eichholz, Rüdiger. Kio estas "komputilo"? AkSt 1986, p.81 1589

1987

- Albault, André. Cent jaroj de evoluo de la Internacia Lingvo Esperanto Perko, Klaus. Memorlibro Graz 1987. Rudovre: Perspektivo 1989, p.32 1967

1990

- Eichholz, Rüdiger. Per longa diskuto al bona solvo AkSt 1988-90 p.186 1673
- Golden, Bernard. Terminologia kaoso: komputilo, komputero, komputoro AkSt 1988-90 p.142 1685
- Pokrovskij, Sergeo B. Kalkuli kaj komputi AkSt 1988-90 p.180 1696

Tiom pri nia propra kontribueto al moderna perkomputora Esperanta bibliografio. Multaj aliaj laboras sur la sama kampo. En la German-lingva »Interlinguistische Informationen« [Intl] de la Asocio por Interlingvistiko (Germana mallongigo GIL) regule aperas aktuala bibliografio de interlingvistiko el la plumo de d-ro Blanke. Intl estas abonebla ĉe Dr. sc. D. Blanke, Otto-Nagel-Str. 110, D-12683 Berlin, Germanujo, tel./fakso +49-30-541.26.33.

Hispana Esperanto-Muzeo, sub la gvido de sinjoro Ludoviko Hernández Yzal, Str. D-ro

Zamenhof 12, E-08739 Sant Pau d'Ordal, Hispanujo, tel. (93) 899.30.03, 899.41.49 same aktivas pri bibliografiado. Ĝi i.a. eldonis la interesan verkon

- Rondo Takács. Inventaro de Planlingvistikaj periodaĵoj. Sant Pau d'Ordal [E]: Hispana Esperanto-Muzeo 1992, 132 p. en formato A4

kaj prizorgas perkomputoran bibliografion de Esperantaj artikoloj. Jen citaĵoj:

- 1554 HUVI 1/1975 ESPERANTO EN LA SPEGULO DE LA MODERNA LINGVOSCIENC LINGVOLOGI SZERDAHELY.
- 1611 E.o Aktuel 2/86 Tri difinoj de la vorto neologismo de Bernard Gold NEOLOGISMO GOLDEN LINGVOLOGIO.
- 1652 KONTAKTO n 108L La nomo de la monatoj de Leif Nordenstorm LINGVOLOGI MONATO

Laŭdire sinjoro Arpád, Máthé redaktas »Periodaĵoj«, Bibliografia organo de Rondo Takács [monata]. Bedaŭrinde nia letero ne estis respondita. Eble vi estas pli bonŝanca ĉe la redakcia adreso: Tusnádi u. 14, H-1125 Budapest, Hungarujo. ISSN 1216-7800.

Elektronikaj registraĵoj en la kadro de Pekoteko

Tie ĉi ni listigas haveblajn elektronikajn Pekoteko-registraĵojn. La informoj baziĝas sur

indikoj de Akademiano R. Eichholz de septembro 1995. Ĉar la dosieroj estas daŭre prilaboritaj, ŝanĝoj povas okazi kaj estas rezervitaj.

Pekoteko-registraĵoj estas liverataj en la formato de *Word-Perfect 4.2 for DOS* (Vopo). Esperantaj literoj estas transkribitaj per sekva x (cx, gx, ktp.). Tiaj dosieroj - ekkoneblaj je la sufikso *.dox estas per la plej multaj al ni konataj modernaj programoj konverteblaj, ekz. per Vopo 5.0, 5.1 kaj 6.0, *Word for Windows 6.0*, Ĉapelilo kaj aliaj programoj por IBM-kongruaj komputoroj. Laŭ informo de Makintoŝ-uzantoj la dosieroj estas uzeblaj ankaŭ por tiu komputora „familio“.

Literoj kun x-kombinoj estas - ekz. per makroo - facile ŝanĝeblaj al la de via programo uzataj kodaĵoj, tiel ke la ĝustaj Esperantaj literoj aperas sur ekranu kaj dum printado. Uzataj estas 3,5 colaj, 1,44 megabajtaj diskedoj formatigitaj per DOS.

Jen sekvas proksimuma enhavo-tabelo de la Pekoteko-diskedoj, kiu tamen listigas nur la plej gravajn fakajn terminarojn unuigitajn sub la Pekoteka tegmento. La kolekto krome enhavas multajn pliajn unuopajn terminojn de aliaj fakoj. Precipe en la „aktualaj terminaretoj“ troviĝas nocio-kompleksoj

kolektitaj fare de la „lingvo-observantoj“.

B1/94:

Registraĵoj faritaj inter 1985 kaj 1988 kaj enhavantaj i.a. jenajn terminarojn:

- Terminaro de hidraŭlaj meĥanismoj
- Terminologia Vortaro (bazita sur eldono de 1969)
- Komputikaj terminoj (1985)
- Terminara Labor-dokumento (bazita sur dokumentoj eldonitaj ĝis 1986)
- Komputikaj terminoj (1986)
- Novaj radikoj el la Esperanta Bildvortaro
- Terminaro pri Dokumentado (1-a parto).

B2/94:

Registraĵoj faritaj inter 1988 kaj 1993:

- Terminaro pri Dokumentado (2-a parto)
- Komputikaj, matematikaj kaj fizikaj terminoj (1989)
- Geografiaj terminoj (1989)
- Botanikaj terminoj (1990)
- Bibliotekaj terminoj (1990)
- Traduko de la nova internacia normo ISO 1087 de 1990, kiu anstataŭas la normon de 1969 (vd. B1/94).
- Modernaj teknikaj terminoj kaj aktuala terminareto (1993).

B3/94:

Registraĵoj de 1994:

- Provtradukoj de la Internacia Elektroteknika Terminaro, Grupo 07, Elektroniko.
- Modernaj teknikaj terminoj kaj aktuala terminareto (1994)

- Terminoj el la forstista "Lexicon Sylvestre". (Arb#001-309)
- Makrooj en la Vopo 4.2 formato
- 2 dosieroj pri juraj terminoj

B4/94:

- Terminaro pri Elektronikaj Muzik-instrumentoj (E. Spitaels, 1988-1989)
- Juraj Terminoj (B. Pabst, 1989-1990)
- Ne-PIV-aj Vortoj, litero A (A. Cherpillod).
- Enkondukoj, klarigoj, lingvaj diskutoj, fonto-verkoj kaj apendicoj el "Plena Pekoteko 1985-1990".

B5/94:

- Universala Decimala Klasifiko (UDK) por laŭfaka ordigado.

B6/94:

- Germana, Angla kaj Franca indeksoj.

B7/94:

- Esperanta indekso.

Kopioj de la plej novaj versioj de tiuj diskedoj estas haveblaj de Rüdiger Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado, K0L 1B0, tel. + 1 (705) 939-6088, aŭ de la redaktanto de Terminoteko. La Pekoteko-kompleto (7 diskedoj) kostas US\$ 35 aŭ DM 50 pageblaj al konto Postbank Hannover 1173-68-306 je nomo de R. Eichholz (ŝanĝoj rezervitaj).

Krome estas havebla de la redaktanto de Terminoteko plia

diskedo kun jenaj provizoraj labor-registraĵoj:

- Cherpillod, André. Ne-PIV-aj vortoj, literoj A-Z (nekompletaj), (parte) prilaboritaj laŭ la sistemo Pekoteko
- Ne-PIV-aj radikoj el: Boirac, Emile. Plena Vortaro Eo-Esperanta kaj Eo-Franca. Dijon 1909 (nekompletaj)
- Ne-PIV-aj radikoj el: Camões. La Luzidoj. Glosaro (nekompletaj)

Elektronikaj registraĵoj ekster la kadro de Pekoteko

Jen estas listigitaj laŭfakte ĉiuj elektronikaj dosieroj por IBM-kongruaj komputoroj, kiuj aperis ekster la kadro de Pekoteko, kiuj havas certan intereson por Esperantaj terminaristoj kaj kiujn ni mem testis. Aperu en tiu listo neniel diras ion pri eventuala kopirajto, precipe ne, ke la dosiero estus libere kopiebla. Ni laŭ niaj plej bonaj scioj indikis la kontaktoblan respondeculon / rajtigiton, se ni konis lin. Tamen ni ne transprenas garantion, ke la indikitaj personoj fakte estas la rajto-posedantoj. **Ni neniel preta pludoni protektitajn dosierojn aŭ iel lezi ies kopirajtojn.** Se ni erare atribuis rajton al malĝusta persono ni petas pri sciigo por tuja korektado. **Pri la dosieroj, kies kopirajto apartenas al ni, ni rezervas la rajton pludoni ilin.**

Listigo nenion diras pri la kvalito de la dosiero. Prezindikoj nur servas kiel unua orientiĝo. **Validas nur la aktualaj prezoj demandebaj ĉe la rajto-posedanto.**

La enskriboj estas ordigitaj laŭ jena sinsekvo: Nomo de la aŭtoro, redaktisto, kunordiginto. Titolo. Mallonga priskribo. Lingvoj. Uzita softvo. Stato de lasta prilaboro. Kontaktadreso.

La nombro de interesaj elektronikaj dosieroj rapide kreskas. Ni dankas pro atentigo pri pliaj dosieroj, kiujn ni volonte publikigos laŭ la sama skemo.

Akademio Internacia de San Marino (AIS)

- Frank, Tilo (red.). Internacia Sciencista Dokumentaro (ISD). Informoj pri Esperantistoj-sciencistoj (adreso, fakoj, verkoj, lingvokonoj ktp.). eo. Memfarita databaza programo. Stato 1992-02-13. AIS, Kleinenbergerweg Weg 16a, D-33100 Paderborn, Germanujo.

Bakado

- Diestel, Wolfram (red.). Alfabeto Vortaro de nocioj pri bakado. s.l. [Markkleeberg, D]: n.i. [Esperanto-Junularo de Lepsiko]. Kun akompana broŝuro 1993, 6+3 p. eo-de. WORD por Vindoza 3.1. Stato 1993-05. Wolfram Diestel, Bauvereinstr. 3, D-Markkleeberg. Tel. 0341-327487.
- dito. Konvertita al Pekoteko-formato. pb

Biblioteka Scienco/Bibliografioj

- Portmann, Doug/Koralo. Biblioteka Terminaro. Pekino 1989. eo, en, fr, de, es (en la libro krome zh, kiu mankas sur la diskedo). Parte kun difinoj kaj rimarkoj. WordPerfect 4.2. Stato 1990-06. Doug Portmann, Usono.
- dito. Plejparte konvertita al Pekoteko kun aldonoj (gramatikaj genroj ktp.) korektoj kaj komentoj. Stato 1994-03.
- Flandra Esperanto-Ligo [FEL]. Listo de livereblaj libroj. Listo de novaĵoj. Antverpeno 1994. Enhavas ĉiujn librojn, kiuj estas eldonitaj de FEL, kaj tiujn, pri kiuj FEL estas la precipa distribuanto. ASCII. Stato 94-06-29.
- Bibliografio de Germana Esperanto-Biblioteko. Gmünder Str. 9, D-73430 Aalen, Germanujo. Tel. 07361-52-2585. . 17.000 bibliografiaj unuoj (nur libroj, ne periodaĵoj) en ASCII-teksto, ĉ. 5 MB sur disketo, densigita sur 3,5-cola disketo kun simpla serĉ-programeto. Originalo antaŭe uzis dBase, nun specialan bibliotekan arkivoprogramon LARS. Diskedo ĉe GEB kontraŭ antaŭpago de 15,- DM sur ties konto 43 808 018 ĉe Unterkoehener Bank (BLZ 600 697 32).
- Esperanto-Biblioteko de pb. Indikoj pri ĉ. 1400 bibliografiaj unuoj pri Esperanto kaj interlingvistiko kun indikoj pri fako, ISBN, BIL k.a.. Databanka programo. Stato 1995-08.
- Esperanto-Katalogo de la Libro-servo de UEA. Libro kaj aliaj eldonaĵoj. Rotterdam [NL]: UEA 1994. La UNIX-originalo konvertita al Rich Text Format (RTF) (ĉ. 750 kb) kaj Vopo 4.2 (ĉ. 400 kb). Sama enhavo kiel la libro (sen la ilustra-

ĵoj), sed perkomputore traserĉebla. UEA, Nw, Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

- Vilborg, Ebbe. «Fokuso, interlingvistika bibliografio 1967-1976». Elektronika versio de pb. Nuntempe ĉ. 1600 gazet-artikoloj pri interlingvistikaj temoj el la jaroj 1967-1970 kaj el aktualaj periodaĵoj. Registrado daŭrigota. Vd. tiun ĉi ckl.

Biologio

- Nova Biologia Nomenklatur. eo, en, fr, nl. WordPerfect 5.1. Stato 1992. 1 diskedo 5,25-cola, alta denseco.
- Plant-Vortaro. Plur-lingva nomaro de sovaĝaj plantoj en Eŭropo. 5a eld. Villingen [D] 1992. Pli ol 4500 nocioj sen difinoj kun rimarkoj. eo, de, en fr, nl, sc, sv. El tio la literoj A-C de la terminaro ordigita laŭ la sciencaj nomoj (sc). Tre simila al Pekoteko kun kelkaj aldonaj reguloj. WordPerfect 4.2. Stato 1992-10. Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, D-Villingen, Germanujo.

Budaismo

- Njanasata. La Koro de l'Budhismo. Sistema kurso en Budhismo laŭ la prilaboritaj tekstoj de H. Schröder. Noveldonita 1994-11-17.
- Schröder, Hermann. Budho kaj la Moderna Homo. Laŭ la 3a aktualiĝita eldono, eld. 1992-05-01. Ambaŭ haveblaj de Ottmár Járeb, Blücherstr. 42, D-71116 Gärtringen, Germanujo. Registrita versio 15,-DM, neregistrita 5,- DM.

Ekologio

- Medvedev, Lav/Jagnjiĉ, Ankica. Ekologia terminaro. eo, ru, ???. Datumbaza programo ISIS de U-

nesko. Stato 1991-01 (ne funkciis per mia komputoro pb).

Ekonomiko

- Bormann, Werner. Kvar libretoj: Konjunkturpolitiko, Entrepreno, Trafiko, Mondkomerco kaj Lingvo. Havebla de Ottmár Járeb Blücherstr. 42, D-71116 Gärtringen, Germanujo. Registrita versio 15,-DM, neregistrita 5,- DM.
- Economie, Finance, Monnaie. Esperanta traduko de multlingva terminaro de Eŭropa Unio. 1150 nocioj sen difinoj. eo, en, fr. WordPerfect 5.1. Roland Rotsaert, Visspaanstr. 97, B-8000 Brugge, Belgujo.
- dito. Konvertita parte al Pekoteko. Stato 1992-06.
- Muniksma, k.a. Internacia Komerca-Ekonomia Vortaro <IKEV>. Elektronika versio de literoj A kaj U-Y. WordPerfect 5.1. Stato 91-10.
- dito. Parte konvertita al Pekoteko. Stato 1992-10-15.

Elektrotekniko

- Prov-registriĝo de Internacia Elektroteknika Vortaro Esperanta - Pola, Angla, Franca, Germana, Itala, Sveda, Grupo 07 Elektroniko, Grupo 08 Elektroakustiko, Warszawa 1965: Polski Zwizek Esperantystów <IEV-Eo-Pl>. Ĉ. 900 terminoj. Sen difinoj, sen komentoj. Sistemo simila al Pekoteko, sed en WordPerfect 5.1. Stato 93-05-09.
- dito. Konvertita al Pekoteko, korigita kaj kompletigita. Stato 94-10.

Forstfako

- Simon, Karl-Hermann, k.a. (red.). Lexicon silvestre. Vortaro de Forsta Fako. 1000 nocioj kun difi-

noj en eo, en, de, fr, es, ru kaj etnolingvaj terminoj en 26 lingvoj. Originalo en datumbaza programo *Paradox*. Diversaj «*run-time-moduloj*» kaj demo-versio haveblaj. IBM-komputoro 80286 aŭ pli pova necesa. Dr. Karl-Hermann Simon, p/a Fachhochschule, Bibliothek, Schicklerstr. 3-5, D-16225 Eberswalde, Germanujo.

Ĝenerala

- Grimley Evans, E.T. Listo de radiokoj kaj vortlisto por STAR. Por perkomputora korektado de Esperantaj tekstoj. Stato 1989-01-10
- Pabst, Bernhard. Inversa Vortaro de Esperanto. Paderborn [D]. Esperanto-Centro 1989. Korektita elektronika versio de la cit. libro. WORD aŭ WordPerfect. Kopirajto ĉe Esperanto-Centro Paderborn, Postfach 1450, D-Paderborn, Germanujo. Stato 1994-03.
- Pabst, Bernhard. Kolekto de diversaj prilingvaj artikoloj. WORD aŭ WordPerfect 4.2.
- Slipara Vortaro. Indekso Germana-Esperanto. WordPerfect 4.2. Stato 1993-10-04.
- PIV. Listo de ĉiuj enskribo-titoloj. Stato 1989.

Historio

- Pabst, Bernhard. Biografioj de famaj Esperantistoj. Nuntempe ĉ. 30. Daŭrigota. Vopo 4.2.
- Wollenberg, Fritz. El la Historio de la Eo-Movado en Berlin. Unua Parto 1903-1918. Berlin 1993: Eo-Ligo. Korektita ASCII-versio de la samnoma broŝuro, kompletigita per indksoj pri personoj kaj orga-

nizaĵoj de Bernhard Pabst. Stato 1993-12.

Komputoriko

(vd. ankaŭ matematiko kaj reto)

- Behr, Michael (kunordiginto). Sistemoj kaj funkcioj de la komputado. 200 nocioj kun difinoj kaj komentoj. eo, en, fr, ru (transskrib.), pl. DBase IV. Stato 1989-06-11.
- dito. Konvertita al Pekoteko (parte). Stato 1993-12-31.
- Pospíšil, Jan. Malgranda glosaro de komputoraj terminoj English, Deutsch, Esperanto, ĉesky. Ĉ. 50 nocioj kun difinoj en Angla kaj Esperanto. en, de, eo, cz. ASCII. Stato 1992-07. Jan Pospíšil, Leningradská 3112, CZ-272 04 Kladno 4, Ĉeĥujo.
- dito. Parte konvertita al Pekoteko. 1992-07.
- Esperanta traduko de la manlibro kaj mesaĝoj de la datobenka programo ISIS de Unesko. Stato 1991-01. (ne funkciis per mia komputoro pb)
- Wulff, Jürgen (red.). Kolektoj 1 kaj 2 de interesaj artikoloj kaj informoj el la KompRoPrecipe pri diversaj solvoj de la problemo de diakritaj literoj en komputorado. ASCII. Sur la disketo troviĝas multaj aliaj utilaj informoj, ekz. Eo-ikonoj, Esperantaj liter-tiparoj kaj voĉ-registraĵoj ligeblaj al certaj Vindozaj okazaĵoj, ktp. KompRo, Bornkamp 12, D-22043 Hamburg, Germanujo.

Kristanismo

- Biblio, La Sankta. Malnova Testamento En komprimata formo sur 3,5-cola disketo, per la programo PKUNZIP elpakebla. Ĝi bezonas 4,2 MB da libera spaco sur la dur-

disko. ASCII. KompRo, Bornkamp 12, D-22043 Hamburg, Germanujo.

- Eichkorn, Bernhard. Kristana vortaro. 200 nocioj parte kun difinoj kaj komentoj. Div. indeksoj. eo, de (kelkaj fr). Baze laŭ Pekoteko (WordPerfect) kun kelkaj aldonaj reguloj. Stato 90-03.

Lernprogramo por Anglalingvanoj

- Butler, M. Esperanto for Beginners. Komputora versio en GWBASIC de Jim Deer k.a. Stato 89-04. R. Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado, KOL 1BO.
- Martins, Antonio, k.a. Komputora Esperanto-kurso por Anglalingvanoj. Simpla programo per kiu oni povas ekhavi jenajn informojn: ĝenerale pri Eo, prononcado kaj alfabeto, lekcioj. Stato 03.93. Reinhard Pflüger, Hermannstr. 3, D-60318 Frankfurt a.M., Germanujo.

Lernprogramo por Esperantlingvanoj

- Járeb, Ottmár. PC-Esperanto. Esperant-lingva eldono de la Germanlingva lernprogramo, vd. tie.

Lernprogramo por Germanlingvanoj

- Járeb, Ottmár. PC-Esperanto 2.0 - 3.3. Informations- und Lernprogramm mit Vokabel- und Konversationstrainer für PC/XT, PC/AT VGA/EGA. Germanlingva programo kun konversacio-trejnilo, kiu informas pri diversaj aspektoj de la Eo-movado kaj ebligas bazan lernadon. de-eo. Stato 1993-95. Priblaborita 05-04-1995. Ottmár Járeb, Blücherstr. 42, D-71116 Gärtringen, Germanujo. Registrita versio 30,- DM, neregistrita 5,- DM

- Martins, Antonio; Pflüger, Reinhard. Komputora Esperanto-kurso por Germanlingvanoj. Simpla programo per kiu oni povas ekhavi jenajn informojn: ĝenerale pri Eo, prononcado kaj alfabeto, lekcioj. Stato 03.93. Reinhard Pflüger, Hermannstr. 3, 60318 Frankfurt a.M., Germanujo.

Lernprogramo por Portugallingvanoj

- Martins, Antonio, k.a. Komputora Esperanto-kurso por Portugallingvanoj. Simpla programo per kiu oni povas ekhavi jenajn informojn: ĝenerale pri Eo, prononcado kaj alfabeto, lekcioj. Versio 01. Stato 01.92. Reinhard Pflüger, Hermannstr. 3, 60318 Frankfurt a.M., Germanujo.

Ludo komputora

- Sikosek, Markus. Serĉu Angela L. Komputora ludo pri geografiaj sci-oj. arvo. Stato 94-03. Markus Sikosek, Kampstr. 75a, D-45966 Gladbeck, Germanujo.

Matematiko (vd. ankaŭ komputoriko)

- Behr, Michael (kunordiginto). Elementoj de matematiko kaj logiko. 200 nocioj kun difinoj sen komentoj. eo, en, fr, ru (transskrib.), de. DBase IV. Stato 1988-07-22.
- dito. Konvertita al Pekoteko (parte). Stato 1993-12-31.

Proverbaro

- Zamenhof, L.L. Esperanta Proverbaro. Komputora versio de Charles R.L. Power. Formato DOS, WordPerfect 4.2. Stato 1987-07-28.

Reto

- Ederveen, Derk. Adresaro de rete atingeblaj Esperantistoj kaj Esperanto-Organizoj. KompRo, vd. tuj.
- Weichert, Martin (komp.). La "Flavaj Paĝoj" de Esperanto. Rapidaj referencoj pri Eo en la [komputora] Reto. KompRo, J. Wulff, Bornkamp 12, D-22043 Hamburg, Germanujo.

Ŝako

- Ŝaka terminaro. Sen difinoj. eo, de, en, fr (parte). Simila al Pekoteko. Stato 1993-06.

Terminologio

- Pabst, Bernhard (red.). Terminoteko. Cirkuleroj pri problemoj de Esperanta terminiko, n-roj 1-11. Stato 1995-08.

Universala Decimale Klasifiko

- Pospíšil, Jan (tradukinto). Universala Decimale Klasifiko. Datumbaza programo ISIS de Unesko. Stato 1991-01 (ne funkciis per mia komputoro pb).
- Eichholz, Rüdiger (tradukinto). UDK-skemo de Pekoteko sen la referencoj al terminoj, tiel ke oni povas uzi ĝin por klasifi, librojn, artikolojn ktp. ASCII, Vopo. La tradukinto.

lom pri Terminoteko

Dek numerojn de nia interaktivula cirkulero ni sukcesis publikigi dum la lastaj kvin jaroj. Ni - malkaŝe dirite -

Terminoteko 11 (1995/1)

Ni - malkaŝe dirite - danke ĝojas, ke ni havis la tempan kaj finanĉan eblon realigi tion. En tiu ĉi numero ni pro tio dediĉas iom da spaco al nia komuna informilo mem.

La plej gravan aspekton ni jam menciis en niaj enkondukaj vortoj sur p. 1. Ni kontrolos la liston de ricevantoj kaj devos forstreki ĉiujn, kiuj jam de longe, t.e. de ckl. 9 ne plu reagis. Do, bv. relegi p. 1 kaj komuniki vian daŭran intereson. La multaj inter vi, kiuj sendis rimarkojn, atentigojn ktp. kompreneble ankaŭ estonte ricevos »Terminoteko-n«. La aliaj ĉiam povos rehavigi ĝin pli poste, se denove ili petos ĝin.

Komence Terminoteko estis leter-formaj sciigoj al rondo de "lingvo-observantoj" en formato A4 (ckl. 1-6). Ckl. 6 la unuan fojon raportetis pri la "ne-Pekoteka mondo". De ckl. 7 ni ŝanĝis al kajeroj en formato A5. Krom informoj pri Pekoteko ni enigis recenzetojn pri vortaroj, terminaroj kaj materialoj interesaj por terminologoj kaj vastigis la adresaron. Estis ĉirkaŭ la tempo, kiam la informilo de Terminologia Esperanto-Centro de UEA en Zagrebo jam ne plu povis bone funkcii. De ckl. 9 ni lasis multoblige la kajerojn pere de Flandra Esperanto-Ligo en

Antverpeno. Koloraj kovriroj plibonigis la eksteran impreson. Intense ni ĉiam gardis la simplan skribon kaj paĝ-aranĝon, sen bildoj kaj modernaj tipografiaj trukoj. Pli gravas kaj daŭre gravas al ni facila rekoneblo kaj precipe la enhavo. Por ke vi facile retrovas artikolojn, ni pretigis aŭtoran kaj teman indeksojn de ckl. 1-10, kiujn vi trovas en tiu ĉi numero.

Per la nuna ckl. 11 ni aŭdacas novan - tamen konservativan - paŝon al plibonigo. Fine de 1994 ni akiris novan komputoron de la tipo 486, multe pli kapabla ol nia "pratempa" XT 8086, kaj ink-sprucan printatoron. Krome ne aĉetis la tekstprogramon *Ĉapelilo*, per kiu prilaboro de Esperantaj tekstoj facile eblas. Ni eksperimentis per la novaj ebloj kaj decidis estonte uzi skribon, kiu espreble faros Terminotekon ankoraŭ pli legebla, la strukturon ankoraŭ pli klara.

Alia ĝojiga novaĵo estas, ke Terminoteko estas registrita en la »Adresaro de la Esperanto-Gazetaro 1994«, eldonita de la gazeto »Eventoj«, eĉ se nur en la parto II »necerte ekzistantaj gazetoj«. La adresaro aperis kiel suplementoj al numeroj 63 kaj 64 (okt. 1994) kaj estas

havebla de Eventoj, pk. 87, H-1675 Budapest, Hungarujo.

Terminaraj informoj el Terminoteko aperis en la revuoj »Eventoj« (pri la sport-vortaro), »La Gazeto« (pri 2a eldono de la Esperanta Bildvortaro kaj la aŭtovortaro) kaj en »Esperanto Aktuell« (Bildvortaro, sportvortaro). La publikigaĵoj rezultis kelkajn inform-petojn kaj kunlabor-ofertojn.

reagoj

De doktoro Detlev **Blanke**, Otto-Nagel-Str. 110, D-12683 Berlin, Germanujo, konata interlingvisto, aperis du Germanlingvaj kontribuoj en ekstermovadaj fakaj publikigaĵoj, kiuj mencias Pekoteko-registraĵojn. »TextconText« 1994/3-4, p.209-224 de la eldonejo Julius Groos, Heidelberg, publikigis lian artikolon »Translation bei Plansprachen - am Beispiel des Esperanto« (tradukado kaj interpretado de planlingvoj - la ekzemplo de Esperanto), kiu koncize priskribas la atingojn kaj specialajn problemojn de tradukoj al kaj el Esperanto. Kadre de la prezento de tradukaj helpiloj doktoro Blanke skribas (p. 218): »Es gibt .. Bemühungen, die in Esperanto ent-

stehenden Fachwortschätze zu bearbeiten und planmäßig weiterzuentwickeln ... Dabei spielen internationale computergestützte fachterminologische Registrierverke eine zunehmende Rolle.« (Ekzistas klopodoj prilabori kaj laŭplane pluevoluigi la disvolviĝantajn fakajn terminarojn de Esperanto. En tiu kadro internaciaj perkomputoraj registraĵoj havas kreskantan signifon.) En sia kontribuo »Fachkommunikation in Plansprachen« (faka komunikado en planlingvoj) al la 24a jar-kongreso de la (Germana) Societo por Aplikata Lingvistiko (Spillner (eld.) Fachkommunikation, p.115) doktoro Blanke klarigas: »Termini in Esperanto gehen stets auf individuelle Benennungsvorschläge zurück, die in Texten oder Wörterbüchern vorgelegt, diskutiert, in der Praxis ausprobiert und schließlich in den Sprachbestand aufgenommen werden. Der Registrierung und internationalen Diskussion dienen u.a. computergestützte Terminussammlungen (Eichholz [Plena Pekoteko 85-90] 1992).« (Terminoj en Esperanto ĉiam ekestas pro individuaj proponoj, kiuj estas prezentataj en tekstoj aŭ vortaroj, diskutataj kaj en la praktiko elprovataj kaj fine enigataj en la lingvan havaĵon. Al la registrado kaj internacia dis-

kutado servas i.a. perkomputoraj termino-kolektoj (Eichholz [Plena Pekoteko 85-90] 1992).).

Ni ĝojas pri tiu dufoja atentigo de la ne-Esperanta scienca mondo pri nia komuna laboro. Ĝi atestas la seriozecon de niaj streboj kaj certe instigas niajn aktivulojn daŭrigi laŭ la voj' elektita. Al sinjorino Blanke, iama terminara aktivulino kaj edzino de doktoro Blanke, ni dankas pro la afabla alsendo de kopioj de la artikoloj.

Sinjorino **Erhard**, Germanujo, dankis kaj skribis: »ĉiam mi legas ĝin kun intereso.« Pro ŝia aĝo ŝi tamen ne plu povos kontribui... kaj kontribuis per trafa rimarko pri la Esperantigo de »Strumpfhose« (ckl.10, p.6) per »pantalón-ŝtrumpoj«. Ni sincere dankas al sinjorino Erhard, kiu apartenis al la unuaj "lingvoobservantoj", pro ŝia intereso kaj helpo kaj deziras al ŝi ĉion bonan por la estonteco.

Tre agraba kaj surpriza reago al ckl. 9 venis el suda Germanujo. **Konata** terminara **aktivulo** tre afable kaj neatendite donacis al ni 50 DM por subteni la eldonon de Terminoteko. Ni elkore dankas kaj uzos la monon por sendado de niaj cirkuleroj al aktivaj samideanoj

en orient-Eŭropaj landoj, kie la reformo ankoraŭ kaŭzas ekonomiajn malfacilaĵojn. Do, ankoraŭfoje ... "dankon".

»... gratulinda laboro. Des pli mi ĝojas, ke nia TK [Terminara Kuriero de la fervojistoj] kaj vi kune laboras aŭ minimume komunikas.«, Heinz Dieter **Hartig**, Bremeno, Germanujo 1994-11-27

»Koran dankon pro la bonega listo de la slipara vortaro de Eichholz [= ckl. 9]«, Wera **Blanke**, Berlino, Germanujo 1994-12-21

»Via bulteno certe utilas. ... Tre bonvenaj ŝajnas al mi viaj recenzetoj pri modernaj vortaroj«, Rüdiger **Eichholz**, Bailieboro, Kanado 1994-11-26

»Kun granda ĝojo mi ekhavis vian etan Terminoteko-cirkuleron n-ro 9. Al mi ĝi plaĉis. ... Vere mi estas konenta ...«, Gert **Heintze**, Rastatt, Germanujo 1994-11-28

»Mi tralegis la plejmulton kun intereso. Pri la enhavo mi gratulas vin. Nur unu afero iom ĝenis min: Mi devis utiligi lupeon.« [Sekvas oferto printi Terminotekon 11 sur pli kapabla printatoro, dankon!]. Bernhard

Eichkorn, Villingen, Germanujo, 1995-02-09

»Pro tio ke mi havas tre malbonan vidkapablon ... mi tre malfacile povas legi la „Terminotekon“ (tro maldikaj kaj tro densaj literoj!).« George **Lagrange**, Bouresse, Francujo, 1995-04-05 [Vd. niajn rimarkojn supre; espereble la nova skribo helpas. Skribo-grando tamen - bedaŭrinde - ankaŭ estas demando de kostoj: Pli da paĝoj, pli da afranko]

»Mi legis ĝin [ckl. 10] kun granda intereso kaj mi vere kontentas ke iu tiel bone okupas sin pri la evoluo de la terminologio de esperanto.« Doktoro W.M.A **De Smet**, Kalmthout, Belgujo 1995-02-14

»... meritplena entrepreno«. Albert **Cnudde**, Annecy, Francujo, 1995-01-23. Sinjoro Cnudde atentigas, ke la Franca traduko de »pren-trogo« en ckl. 9, p. 44 prefere estu *benne preneuse*.

Al sinjoro R. **Hauger**, ĝenerala sekretario de Internacia Scienca Asocio Esperantista (ISAE) ni estis proponinta, ke kontribuantoj al Scienca Revuo pli aktive kontribuu ankaŭ al la terminara diskuto, ĉar ili ja estas sciencistoj, kiuj konas

terminarajn problemojn el la praktiko de skribanto kaj do havas riĉajn spertojn. Je nia ne malgranda surprizo sinjoro Hauger respondis i.a. jene: »Mi bone konas la problemojn de aktuala terminologio en la sciencoj kaj teknikoj el praktiko de skribanto kaj de redaktoro. ... Mi ne rajtas [?] kaj ne intencas enmiksi en la eliton rondon de la multaj t.n. akademianoj de la alia aŭ de la kontraŭa frakcio - se ili nur liveras rezultojn! La intenco de ISAE estas ĝuste la priskribo de rezultoj pere de esperanto kaj ne la priparolado pri esperanto.« Aldone sinjoro Hauger atentigas pri la ebleco publikigi en Scienca Revuo. Ni ne volas prikomenti tiun leteron, tamen bedaŭras, ke sperta Esperantisto opinias, ke li »ne rajtas« pludoni siajn spertojn. ISAE estas kontaktebla ĉe sinjoro R. Hauger, Ringstr. 13, CH-8172 Niederglatt, Svisujo, tel. 0041-1-850 2882.

Akademiano Eichholz reagis al la informo pri la **stomatika terminaro** de *Marían Pavlík* (Terminoteko 10, p. 10): »Bedaŭrinde la specimena Angla termino el la stomatika vortaro "cirkulas saw" devus esti "circular saw". Laŭ McGraw tiuspeca segilo estas: »Any of several power tools for cutting wood or

metal, having a thin steel disk with a toothed edge that rotates on a spindle.« Ĉu tiuspeca ilo estas uzebla en stomatologio? "cirklo-segilo" estas laŭ mi maltrafa, ĉar tio devus esti ilo por segi cirklojn! En EB la termino estas "diska seg-maŝino" (EB#128/5).«

Bedaŭrinde ni ne konas la adreson de sinjoro Pavlík por peri la demandon. Ĉu iu povas helpi?

Pri la **aŭtomobil-vortaro** Akademiano Eichholz informas, ke per la komputoro, kiun donacis Bruce Crisp kaj kiun li tial povis prunti al konato, tiu ĉi nun klavas la Anglajn terminojn de granda bonege ilustrita multlingva aŭtomobil-vortaro. Temas pri la sama helpanto, kiu jam faris bonegan laboron je la sport-vortaro.

Fine sinjoro Eichholz pri „**Slovena**“ atentigas, ke ekzistas Slovena-Germana kaj Kroata-Angla versioj de Duden Bildwörterbuch, tria eldono <DB3>. Komparante tiujn vortarojn kun la Esperanta Bildvortaro <EB> oni certe povus trovi Esperantajn ekvivalentojn por multegaj Slovenaj terminoj. Se terminoj ankoraŭ ne estas tradukitaj en EB, 3a eldono <EB3>, li estus danka ricevi termino-proponojn por la nun

preparata nova versio de la Bildvortaro.

Sinjoro Vilhelmo **Lutermano**, Fonto Gazela, Embro kaj Kastelmaŭro, F-11360 Durban'-*Corbières*, Francujo kritikis nian recenzeton de la **Grand Dictionnaire** en ckl. 10 kaj i.a. skribas: »Vian laŭdon pri la „Grand Dictionnaire“ mi tute ne komprenas. Malofte oni eldonas vortaron, kiu tuj poste bezonas korektoliston 13-paĝan, kiu ankoraŭ delonge ne kompensas la monstrajn fuŝaĵojn. ... [M]i ne scias, kiel vi [t.e. pb] povas taksi serioza tiun verkon, kiu listigas ĉiujn sinonimojn oficialajn kaj fremdajn por diversstilaj uzoj tute sendistinge [tiel ke uzi la vortaron nur povas] tiu, kiu jam kompetente regas E-on. ... « Fine sinjoro Lutermano atentigas pri pliaj negativaj recenzoj de R. Hauptenthal („Multloke misgvida kaj erariga“, Iltis-Forumo 1993, p. 73-83) kaj F. Simonnet („Ne! Vortaron oni ne rajtas fari tian“. Literatura Foiro 1994, n-ro 151, p. 237-243). Ni dankas pro la atentigoj kaj ripetas nian inviton estonte ankaŭ per recenzoj kontribui al la vigleco de Terminoteko.

Sinjoro Gerd **Bernhard**, Andlauweg 16, D-89134 Blau-

stein, Germanujo, tre aktive sendis al ni listojn de ne-PIV-aj vortoj, interesaj kunmetaĵoj de modernaj nocioj ktp., kiujn li trovis en la Esperanta gazetaro, precipe en «Monato». Ni sincere dankas kaj esperas, ke ankaŭ aliaj lingvo-observantoj reaktiviĝas.

Sinjoro Karl-Gustaf **Gustafsson**, Aspvägen 1a, S-54141 Skövde, Svedujo kontrolis kaj aldonis Svedajn terminojn en diversaj dosieroj, kiujn ni sendis. Ankaŭ al li dankon pro la kontribuo.

novaj terminaroj

Elektroteknika ...

Internacia Elektroteknika Vortaro Esperanta, Pola, Angla, Franca, Germana, Itala, Sveda estas rehavebla sur diskedo klavita en WordPerfect 4.2 (plej aktuala versio) aŭ 5.1.

En nia ckl.3 de majo 1992 ni serĉis volontulon, kiu pretus reklavi la tutan verkon per komputoro. Pro la grandanima helpo de sinjorino **Van de Brande**, Belgujo, nun nur unu jaron poste la terminaro denove estas havebla. Necesas ankoraŭ reviziado kaj elsarko de

klav-eraroj. Helpemuloj kun rego de unu aŭ pluraj el la cititaj lingvoj skribu al la redaktanto.

Fervojista I ...

Jam dise en la gazetaro oni anoncis ĝin (vd. ekz. «La Merkato» n. 44, apr. 1994, p. 10, referencante al la Brita Passenger Rail Management, okt. 1993), en oktobro 1994 ĝi fine aperis: CD-ROM-versio de la multlingva fervoja terminaro de UIC [Internacia Fervoja Unuiĝo], Parizo, kiu ankaŭ enhavas Esperantan parton. Pri la libroforma eldono kaj la aktivecoj de la Esperantaj fervojistoj vi jam povis legi en Terminoteko 8, p. 9 kaj 10, p. 11. La interesege nova pri tiu elektronika eldono estus ĵus tiu "nova vesto". Sur kompaktaĵoj (laŭ Angla mallongigo CD), legeblaj per specialaj aparatoj konektitaj al komputoroj, eblas registri gigantajn amasojn de informoj ("dataoj") je malgranda prezo. Ili pro tio estas pli kaj pli uzataj por enciklopedioj, vortaroj, adresaroj, bibliografioj ktp., do multinformaj verkoj, kiuj tendencas rapide malaktualiĝi. Krom la malmultkosteco precipa avantaĝo estas, ke oni povas serĉi laŭ diversaj kriterioj en la sama teksto, ekz. laŭ di-

versaj lingvo-kombinoj, kio ne eblas en libro. Do, kompaktaĵoj certe ankoraŭ fariĝos pli gravaj en la estonteco. La UIC-disko certe markas historian punkton de la Esperanta terminologio, ĝi ja estas laŭ nia scio la unua CD-ROM-a terminaro enhavanta ankaŭ la Internacian Lingvon. Jen la teknikaj detaloj de la t.n. »RailLexic«: . 15.000 nocioj en 11 lingvoj, nome en la Germana, Angla, Franca, Itala, Nederlanda, Pola, Portugala, Sveda, Hispana, Hungara kaj Esperanto. En preparo estas la Dana, Latva, Norvega, Rusa, Ĉeĥa.

Fervojista II ...

»Terminara Kuriero« (»TeKu«), komunikilo de terminara komisiono de la fervojista asocio IFEF informas pri kunsidoj de la fervojistoj-terminaristoj dum la IFEF-kongreso en majo 1995 en Pécs, Hungarujo. I.a. oni traktis la demandon, kiel uzi Pekotekon kaj kontribui al ties evoluigo. TeKu 96 enhavas areton da terminare interesaj problemoj, ekz. pri »krita/kriza tensio«. Sekretario por terminaraj aferoj estas d-ro Heinz Hoffmann, Ledenweg 43, D-01445 Radebeul, Germanujo.

Flaŭrista ...

La Rondo de Esperantistaj Flaŭristoj (REF), fondita en 1985 en tiu ĉi jaro festas sian dekjaran agadon .. i.a. per daŭre vigle laboro. Je 95-01-01 aperis nove prilaborita «REF-regularo por la registrado de nomoj en Plant-Vortaro» (35 p. en formato A5), prilaborita eldono de la kajero de 94-05-15. Frukto de longa praktika laboro kaj spertoj, ĝi enhavas i.a. detalajn, tamen tre klarajn kaj facile memorigeblajn regulojn por transskribi la internaciajn sciencajn plant-nomojn bazitajn sur la Latina al sciencaj Esperantaj nomoj. Jen ekzemploj: *Aphanes arvensis* L. *Afan-***/o *Agr/a*; *Carex arenaria* L. *Kareks/o* *Sabl/a*. (** = radiko ne jam registrita en PIV). La reguloj kritike traktas kaj pluevoluas la transskribo-sistemojn de Wüster, Neegard kaj Støp-Bowitz. Ili estas interesaj ne nur por botanikistoj, sed ankaŭ por zoologoj kaj ĝenerale por ĉiuj, kiuj bezonas transskribi Latinajn nomojn.

La REF-regularo kvazaŭ estas la ĝenerala parto de »Plurlingva nomaro de sovaĝaj plantoj en Eŭropo« <PnspE>. La oka (!) „papera“ eldono kun ĉ. 700 paĝoj (!) aperis por la tiu ĉi jara "flor-semajno" de la 14a

ĝis 20a de majo 1995 en Montferrier, Francaj Pireneoj. Ĝi probable estas la plej ampleksa terminaro de unuopa fako iam ajn aperinta en Esperanto. Specimenan paĝon de tiu giganta verko ni montros sur la antaŭlasta paĝo. Informoj pri la estontaj flor-semajnoj, REF-regularo kaj la unika terminaro estas haveblaj de sinjoro Bernhard Eichkorn, Romäusring 20, D-78050 VS-Villingen, Germanujo (30 DM plus afranko).

Biologia ...

Tute alian metodon ol la flaŭrista rondo (vd. supre) aplikas la Asocio por la Enkonduko de Nova Biologia Nomenklaturaro (NBN). Ĝi ne estas Esperanto-terminologio, sed scienca terminologio, kiu uzas Esperanto-vortojn. Ĝi ne klopodas trovi Esperantajn ekvivalentojn de la ekzistanta internacia scienca ("Latina") nomenklaturaro, sed ellabori propran, novan nom-sistemon pli logikan, racian kaj pli facile memoreblan, bazitan sur Esperanto anstataŭ la scienca "Latina". Ĉiu nomo de specio aŭ de iu ajn alia taksono klare informu pri ĝi kaj ebligu trovi ĝin en la tuto de la vivantaĵoj. Jen kelkaj ekzemploj, kiujn ni prenis el informfolio de NBN:

Tapirus pinchaque
Tapiro lanhara
Hymenolaimus malacorhynchus
Anaso obtuzbeka
Zalophus californianus japonicus
Orelfoko familitipa japanmara

Laŭ informo de NBN komence de 1995 ekzistas 1340 de la asocio "agnoskitaj" nomoj. La sistemo de NBN kaj ĝiaj »leksikonoj« kun Esperantaj, Anglaj, Francaj kaj Nederlandaj terminoj, same kiel informoj pri membreco estas haveblaj de NBN, Hertendreef 12, B-2920 Kalmthout, Belgujo, tel. (03) 666 99 49.

PS: Ni certe apenaŭ ion komprenas de biologio, sed ni dankas al la Sinjoro, ke ni ne devas parkeri nomojn kiel tiu Hymeno-io por nomi anason!

PPS: NBN skribas: »Ĝis nun ne ekzistas NBN-nomo por Jurassosaurus nedegoapeferkimorum, sed la iam formota NBN-nomo certe estos pli simpla!« Viaj proponoj, kiel ĉiam en Terminoteko ankaŭ pri tio problemo estas bonvenaj!

Geografia ...

Mi, Lorens'. Toponimia terminaro. 2a eld. Manchester [GB]: Istlia Eldonejo E-ista. 1994, 28 p.

Laŭ revuo «Esperanto» 1994, p.195 temas pri »plibonigita kaj pli ampleksa dua eldono« de la listo de »nomoj de landoj kaj landanoj«. La - sufiĉe kritikindan - unuan eldonon ni recenzetis en Terminoteko 7 p. 5.

Jura ...

Slavjanska Akademia Centro de Administrado, Entreprenado, Juro (prof. Fjodor Poddubnij) kompilis juran terminaron Esperantan-Rusan-Ukrainan-Anglan kun 2587 terminoj. Esperanto estas baza lingvo. Mendebila ĉe UEA je 59,70 NLG [laŭ »La Merkato« n-ro 48 (aprilo 1995)].

Komputora ...

Pokrovskij, Sergio. Komputika Leksikono. Jekaterinburg [RUS]: Sezonoj, 1995, 365 paĝoj, ĉ. 35 DM.

La aŭtoro, en 1995 nove elektita membro de la Akademio, tre zorge ellaboris ampleksan enciklopedian vortaron pri la komputa scienco (informadiko; vd. jam Terminoteko 10, p. 20). Ĝi entenas 1960 Esperantajn terminojn kun difinoj kaj klarigoj. Precipe atentitaj estas la bazaj nocioj de teoria komputi-

ko, diskreta matematiko, programado, personaj komputoroj kaj "surtabla tipografio". Krome la verko entenas priskribon de ĉiuj nocioj de la programlingvo *Pascal*. Anglaj tradukoj de la terminoj kaj Angla-Esperanta listo de 2020 terminoj, multaj grafikaĵoj, longa listo de referenc-verkoj kaj font-indikoj kaj kritikaj atentigoj pri evitendeco kompletigas la vortaron, kiu celas ĉiujn, »kiujn interesas komputiko«.

Ĉu ĝi tamen trafas ilin oni rajtas pridubi. Ĝia tre fakeca lingvaĵo certe estas malfacile komprenebla por simplaj uzantaj de komputoroj, kiuj ne havas multajn konojn pri matematiko kaj informadiko. Aliflanke ili vane serĉos multajn bazajn nociojn el tiu rapide kreskanta kosmo de elektronikaj maŝinoj. La aŭtoro konscias pri tio, klarigante en la antaŭparolo: »[E]n nia Leksikono ni malpli ol kutime zorgas pri la aparataro, sed kompanse pli ol tradicie ni atentigas la eternajn verojn de matematiko«.

Speciala problemo de ĉiu komputora terminaro krome estas la malstabila Esperanta lingvo-uzo pri eĉ bazaj terminoj en tiu rapidege ŝanĝanta scio-kampo. Bona ekzemplo estas la malnovaj diskutoj pri "kompu-

tilo - komputero - komputoro" (vd. liston en tiu ĉi ckl.) aŭ "datumoj - datenoj - dataoj", ktp. Ne ĉiam ni rekte komprenis la elektitajn terminojn, foje necesis eĉ okulumi al la Angla traduko. Nelaste tio ŝuldiĝas al la lingva koncepto de la aŭtoro, kiun li prezentas ekzemple sub la enskribo-titolo "-il/". Al tiu sufikso Pokrovskij sendistinge atribuas tri malsamajn signifojn, nome 1. programa rimedo (asemblilo), 2. aparata rimedo (presilo, skanilo) kaj 3. lingva esprimilo (citilo, ligilo) kaj klarigas: "Uzante unu saman sufikson por diversspecaj rimedoj oni riskas ricevi amasiĝon de samfinaj vortoj [fakte!]. Sed tio estas tre akceptinda prezo de sistemeco [! ĉu vere?]." Laŭ ni ne temas pri sistemeco, sed pri senpensa paŭsado de la Angla sufikso "-er" je kosto de dezirebla (kaj atingebbla!) klareco.

Resume do temas pri ampleksa, bone dokumentita kaj grafike alloga terminaro, kiu tamen ne ĉiam facile gvidas ordinaran uzanton de komputoroj pro elekto de terminoj, fakeco, lingvaĵo kaj fona lingvo-koncepto.

Matematika ...

Reiersoel, Olav. Matematika kaj stokastika terminaro Esperanta. Oslo: Universitato de Oslo, 2a eld. 1994, 144 p. ISBN 82-553-0894-6.

800 terminoj kun difinoj, Eo-Angla kaj Angla-Eo registro, principoj por termin-elekto kaj notoj pri kelkaj terminoj. [Lau «Esperanto» 1994, p.195.]

Neologisma ...

Gunkel, Nikolao J. GuVo - Gunkela Vortaro. 2a eld. 1994. Paderborno: La aŭtoro. 44 nenumeritaj paĝoj kopiitaj. Broŝuro havebla de la aŭtoro Claus J. Günkel, Pf. 10 04 47, D-41704 Viersen, Germanujo.

La broŝuro enhavas enskribojn kiel jenaj

plemplem/a

Freneza, idiota (kun nuanco de indulgemo kontraŭ la frenezulo).

Ŝverin/o

Ĉefurbo de la germana federlando Meklenburg-Antaŭpomerio ...

tekvondo/o

Certa defend-arto. Fonto: koncize 2/1988.

tiramis/o

Itala dolĉaĵo.

La aŭtoro trovis la vortojn dum legado aŭ aŭdis ilin en konversacioj, kolektis, laŭ la

stilo de PIV difinis ilin kaj aldonis fontojn. Precipe do salutinda laboro. Tamen oni nur severe kaj kritike uzu la kolekton, ĉar ĝi enhavas multajn, ofte kapricajn privatajn kreaĵojn de la aŭtoro, vortojn, kies bezono aŭ formado ŝajnas diskutablaj. Aliflanke inter la multaj radikoj certe troviĝas aro interesa kaj ne kritikinda (ekz. Esperantigoj de propraj nomoj aŭ manĝaĵoj).

terminaraj projektoj

Esperanta Bildvortaro premiita Nova eldono preparata

La partoprenintoj de la Internacia Esperanto-Konferenco, okazinta en Homburgo / Sarlando de la 16a ĝis 22a de julio 1994, atribuis la ĉi-jaran OSIEK-premion al la fama »Esperanta Bildvortaro« eldonita en 1988 de Akademiano Rüdiger Eichholz. Per tio ili honoris vortaron, kiu »estas nemalhavebla kompletigo de PIV«, sen kiu »oni ne povas verki modernan tekston en Esperanto«, kiel skribis Eugène de Zilah en sia prezentado de la konkurantaj verkoj en »La Gazeto« 1994 n-ro 5. Samtempe oni tiel honoris ankaŭ la gigantan laboron de 144 kunlabo-

rintoj, kiuj dum 24 jaroj (!) kontribuis al Esperantigo de 25.000 (!!)

teknikaj terminoj difinitaj per desegnaĵoj sur 880 paĝoj. 16 kontribuintoj ne ĝisvivis la aperon de la Bildvortaro. Inter ili troviĝas tiel konataj Esperantistoj kiel *Christaller*, *Butler*, *Sekelj* kaj *Setälä* por nomi nur la eble plej konatajn. Nelaste la aljuĝo de la libro-premio ankaŭ estas justa agnosko de la obstina laborego de Rüdiger Eichholz sur terminara kampo.

Tamen sinjoro Eichholz ne intencas "paŭzeti sur la laŭroj". Ĉar de la nuna Bildvortaro nur restis malmultaj ekzempleroj, li komencis traduki la pli modernajn 3an kaj 4an eldonojn de la Germana fonto-verko »Duden-Bildwörterbuch«. Kvankam ĉ. 80 % de la terminoj estas identaj kun tiu de la 2a eldono, sur kiu baziĝas la Esperanta traduko, preskaŭ ĉiuj desegnaĵoj estas anstataŭigitaj per pli modernaj. Krome estas aldonitaj tute novaj bildtabuloj ekz. pri komputorado. Specimenan paĝon vi trovas apude. Serĉata estas "nova generacio" de tradukantoj, kiuj pretas Esperantigi la ankoraŭ mankantajn terminojn de la novaj eldonoj. Nepre ne plu daŭru 24 jarojn ĝis aktualigita eldono aperos!

Interesatoj skribu al Rüdiger Eichholz, Bailieboro, Ontario, Kanado, KOL 1BO aŭ la redaktanta. Ili indiku, pri kiuj temoj ili interesiĝas kaj en kiuj lingvoj ili deziras ricevi fotokopiojn de la tradukotaj paĝoj (Angla, Ĉina, Franca, Germana, Hispana, Japano, Kroata, Nederlanda aŭ Slovena). Krome ili indiku ĉu, kaj se jes kiun, komputoran sistemon ili uzas. Kontribuantoj estos listigataj je la fino de la verko kaj rajtos aĉeti ĝin kun 50-procenta rabato.

Kiu interesiĝas pri la regularo de la venonta OSIEK-premio aŭ ŝatus kundecidi, skribu al »La Gazeto«, F-55210 Creuë, Francujo. [Laŭ nia artikolo en »Esperanto Aktuell«]

Reage al ĝi sinjoro Wolfgang **Bohr**, Johannes-Kirschweg-Str. 11, D-53474 Bad Neuenahr, Germanujo, jam anoncis sin por prilabori la botanikan terminaron. Sinjoro Bohr profesie estas inĝeniero pri hortikulturo. Sinjoro Bernhard **Eichkorn** (be), Romäusring, D-78050 VS-Villingen, kunordiganto de la Rondo de Esperantistaj Flaŭristoj (REF) jam ekaktivis pri la sama temo kaj prilaboris la tabulon »foliarbaroj«. Sinjoro Claus J. **Günkel** (cjg), Pf. 10 04 47, D-41704 Viersen, same anoncis sin por

traduki paĝojn pri matematiko kaj aŭtomobiloj. Ni bonvenigas ĉiujn „novulojn“ en nia aktivula rondo („aro“) kaj esperas, ke multaj aliaj sekvas ilian ekzempleron. Respondojn al ni.

betona...

Sinjoro Jan Werner, Kroftova 84, CZ-616 00 Brno, Ĉeĥujo verkas »terminaron pri betono kaj betonistaj laboroj«.

ekonomia l...

»La Merkato« n-ro 48 de aprilo 1995 raportas, ke la Terminara Sekcio de Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo okupiĝis en 1994 pri la Esperantigo de la oficiala vortaro de la komisiono de EU *Glossaire du monde du travail et du mouvement syndical*. IKEF nomas ĝin »Sindikata Terminaro«. Pro manko kaj malsano de kunlaborantoj kaj pro diverĝo de opinioj pri pluraj terminoj la laboro bedaŭrinde stagnas. La ĝisnuna kunordiganto, sinjoro Wiersch, »denove kaj definitive demisiis de sia posteno«. Eblaj posteuloj kontaktu sinjoron Franz Josef Braun, Hornisgrin-destr. 8, D-77815 Bühl, Germanujo.

ekonomika II...

En ckl.10, p. 15 ni jam menciis la agadon de Akademiano YAMASAKI Seikō, J-185 Tōkyō, Kokubunzi, Higasi Koigakubo 3-18-12, Japanujo pri ekonomika terminaro. Intertempe sinjoro Yamasaki sendis al ni la unuajn cent nocio-kompleksojn. Fakuloj pri ekonomiko bv. rekte sendi siajn reagojn al sinjoro Yamasaki.

geofizika...

Sinjinino Olga Lidia Menezes Duarte, Santa Cruz del Norte, Apdo 6, C.P. 32900, La Habanna, Kubo, serĉas kunlaborantojn por krei fakvortaron pri geofiziko. [Laŭ Monato 1995/3, p. 31].

muzikila ...

Sinjoro Georges Lagrange, „La Kvinpetalo“, F-86410 Bourses, +33-49.42.80.74, emerita piano-agordisto kaj -riparisto, laboras super „piano-terminaro“. Ĝi enhavas ĉ. 400 terminojn en la ĉapitroj »Meblo, Klavaro, Meĥaniko (meĥanismo), Strukturo (sonkrea strukturo), Agordado (akustiko) kaj Tehnologio (ilaro, materialo)«. Jen

kelkaj ekzemploj el la ĉapitro »Meblo«:

KRUC-KORDA PIANO: Piano (stara aŭ vosta) kies kordoj estas muntitaj tiel ke la basaj formas ebenon kruce super la mezaj por gajni longon.

F: piano cordes croisées

G: [mankas ankoraŭ]

A: [mankas ankoraŭ]

LIRO: Vertikala lignaĵo fiksita sub la korpo de vost-piano kaj enhavanta la pedalojn kaj pedal-stangojn.

F: lyre

LIRO-STANGO: Stangoj, kiuj firmigas la ortecon de la liro sub la korpo de la vost-piano.

F: tige de lyre

La terminaro baziĝas sur Franca originalo, kiun sinjoro *Lagrange* jam verkis kaj kiun li nun tradukas en Esperanton. Tajpitan (ne-komputoran) liston en formato A4 kun enskriboj similaj kiel la supraj specimenoj li ŝatus »prezenti al pluraj diverslingvaj samprofesiuloj por interkonsenti pri la vortoj.« Poste etnolingvaj tradukoj estu aldonotaj. Interesataj fakuloj skribu al *Bouresse*.

sporta ...

Tre detala sport-vortaro kun ĉ. 400 terminoj estas tradukata al Esperanto. Ĝi enhavas terminojn en Germana, Angla, Hispana kaj Franca kaj estas elektronike havebla (sistemo

MS-DOS por IBM-kongruaj komputoroj, transformo al Me-kintoŝ kaj Atari ebla). La aranĝo okazis laŭ la elektronika vortaro »Perkomputora Termina-Kolekto«. Jen kelkaj specimenaj nocio-kompleksoj:

{U1} 796.42
{eo1} **akcel-zon/o** *b
{de1} Anlauffläche *f* *a
{en1} acceleration zone *a
{es1} zona de impulso *a
{fr 1} zone d'élan *a
Fon: *a USpor#1; *b ei; *c
94 / USpor-0001
Rim: «94-10-15»

{U1} 796.42
{eo1} **en'aer/a faz/o** *b
{de1} Flugphase *f* *a
{en1} action in the air *a
{es1} fase aérea *a
{fr1} phase *f* aérienne *a
Fon: *a USpor#2; *b ei; *c
94 / USpor-0002
Rim: «94-10-15»

{U1} 796.42
{eo1} **ripet/it/a prov/o** *b
{de1} wiederholter Versuch *m* *a
{en1} additional trial *a
{es1} intento de mejora *a
{fr1} essai *m* supplémentaire *a
Fon: *a USpor#3; *b ei; *c
94 / USpor-0003
Rim: «94-10-15»

Kiu ŝatus traduki la ankoraŭ mankantajn partojn aŭ kontroli la jam tradukitajn kontaktojn la redaktanton. (Tiu informo mal-longigite jam estis publikigita en »Esperanto Aktuell« kaj en »Eventoj«).

korektoj

Sinjoro Yamasaki Seikô (ys) prave atentigas, ke en lia eseo »Terminologiaj observoj« en la nova revuo »Japana Esperantologio« n-ro 1 (aŭg. 1992) la problemo de la ĝusta Esperantigo de la nocio »aufheben« de la Germana filozofo *Hegel* nur estas la ekirpunkto de liaj pripensoj (vd. Terminoteko n-ro 10, p. 26). Fakte la 21-paĝa kontribuo enhavas multajn pli-ajn legindajn konsiderojn interesajn (ankaŭ) por terminaristoj, i.a. pri »duoblaĵoj de vortoj latin-devenaj«, »civilizo de traduko« k.m.a. Aspekton, kiun ni ŝatus nomi kulturfilozofian, pri la »avantaĝoj de la periferio«, sinjoro Yamasaki intertempe reprenis en artikolo en »Monda Forumo« n-ro 6 de apr. 1993, p.25s. Volonte ni do ripetas nian rekomendon akiri »Japananan Esperantologion« ĉe Japana Esperanto-Instituto, Waseda-mati 12-3, Sinzyuku-ku, Tokio 162, Japanujo.

En ckl. 10, p. 4 bv. korekti la nocio-komplekson »biciklo« jene: {en1} bicycle, {fr1} bicyclette *f.*

Sinjoro Lagrange atentigas, ke la Franca traduko de la mis-

fama *ventŝirmilfostgarnaĵo* el la aŭtomobil-vortaro (ckl.10, p.15) estas tre dubinda. Devus esti *montant* kaj probable *garniture* anstataŭ *garnissage*. Do ankaŭ en la Franca parto, same kiel en la Germana la vortaro ne estas fidinda. Kiu transprenos la taskon fidindigi ĝin?

kiu helpas?

Akvomastrumada fakvortaro

En »Interfake« n-ro 10, dec. **1980**, p. 37-38, ni legis pri projekto de 11-lingva, 1500-vorta akvomastrumada terminaro, ellaborita enkadre de la iama Konsilio de Reciproka Ekonomia Helpo. Je tiu projekto ankaŭ kunlaboris inĝeniero FIATAL Dénes kaj matematikisto MANDLER, György.

Laŭdire la listoj de Hungaraj kaj Esperantaj terminoj - ambaŭ kun identigaj numeroj - jam estis klavitaj per komputoro. El tiuj elektronikaj dosieroj ŝajne jam estis presitaj vortaroj Hungara-Esperanta kaj Esperanta-Hungara.

Nia letero al Hungara Esperanto-Asocio kun la peto pri detaligo ne estis respondita.

Pro tio ni nun petas niajn le-
gantojn laŭeble respondi je-
najn demandojn:

- ĉu la 11-lingva vortaro in-
tertempe aperis kaj se jes, kie
ĝi estas havebla?

- ĉu kaj se jes kie la listoj
eo-hu kaj hu-eo estas ha-
veblaj?

- ĉu la elektronikaj dosieroj,
per kiuj la listoj estis produkti-
taj, ankoraŭ ekzistas?

- ĉu vi povus peri al ni la
kontakton al la iamaj kunlabo-
rintoj sinjoroj **Fiat** kaj **Mand-
ler**?

Sinceran dankon anticipan
por ĉiuspeca- eĉ negativa -
respondo.

Angla-Esperanta vortaro

Antaŭ iom da tempo ni rice-
vis informon, ke sinjoro Martin
Morris, 5 Larkfield Close, Hay-
es, Bromley, Anglujo BR2 7ES
preparus Anglan-Esperantan
vortaron. Bedaŭrinde sinjoro
Morris al nia letero ne respon-
dis. Eble ĝi ne atingis lin. Kiu
konas lian aktualan adreson aŭ
scias ion pri la projekto?

venont-numere vi legos ...

PIV en elektronika vesto

Prof. Michel Duc Goninaz,
Val Saint-Georges, Chemin de
l'Échelle, F-13100 Aix-en-Pro-
vence, Francujo, gvidas ron-
don, kiu prizorgas aktualigotan
version de PIV surbaze de ska-
naĵoj de la libroforma eldono.

Multlingva Elektronika Vortaro (MEVo)

La vivo-verko de s-ro Eich-
holz kunfandiĝas en unu gigan-
ta vortaro enhavanta PIV-on,
Bildvortaron kaj Pekotekon. Ĝia
nomo ... MEVo.

Mikrofiĉa eldono de Wüster

Enciklopedia Vortaro K-Z aperis
ĉe IEMW, Vieno.

[En la printita originalo sur tiu ĉi paĝo troviĝas kopio de paĝo el la nova eldono de la Esperanta Bildvortaro. Ĉar ni ne havas ĝin en elektronika formo ni devas rezigni pri ĝi en la represo.

Bernhard Pabst, 09.2006

Enhave senŝanĝa represo de la eldono Septembro 1995. Plej multaj kontakt-eblecoj ne plu estas aktualaj, kelkaj kunlaborintoj intertempe mortis. Kelkaj el la menciitaj terminaroj nuntempe estas troveblaj en la Reto.

Parto de la Elektronika Bibliografio de Esperantaj Artikoloj (EBEA) nun estas trovebla je

<http://www.esperantoland.org/ebea/>

Pri la aliaj eroj kontaktu nun

**Bernhard.Pabst[ĉe]gmx.de
(anstataŭigu [ĉe] per @)**

© Bernhard Pabst, 09.2006

**Indekso laŭpersona de
Terminoteko n-ro 1 - 10**

La unua cifero indikas la kajero-
numeron, la posta(j) la paĝo-
numero(j).

La ktl. 1-2 aperis origine en forma-
to A4 kaj poste estis ŝanĝitaj kaj ak-
tualigitaj al formato A5. La indikoj
referencas al la A5-versioj.

Albault, André	7,6
Arana, Aitor	10,16
Behr, Michael	10,20
Berizzi, Philippe	10,27
Blanke, Wera	6,2. 10,2,3
Bormann, Werner	8,9. 10,4. 10,14
Broadribb, Donald	10,2. 10,3. 10,23
Chaves, Sylla.....	7,4
Cherpillod, André	7,4
Chhim Sokha	10,19
Cnudde, Albert	10,4
Cool, J.	7,2
Danvy, Jean-Pierre	10,8
Davkaev, Eŭgeno A.	10,17
De Smet, Wim	6,2
Diestel, Wolfram	10,10,27
Duc Goninaz, Michel	6,3
Ederveen, Dirk	10,27
Eichholz, Rüdiger	1,1. 6,1. 7,2,5. 9,1.10,5,14,27
Eichkorn, Bernhard	6,2. 8,4,8. 10,2
Flammer, W.	8,8
Hršel, Zdeněk	10,15
Jackson, Ian	6,2. 8,12
Fox, Brian	10,14
Grimley Evans, E.T.	7,7
Grobe, Edveno	6,1. 8,6
Gustafsson, Karl-Gustav	10,9
Habel, Ulrich	8,7
Harry, Ralph	10,15. 10,19
Hartig, Heinz-Dieter	8,9. 10,11
Hegel	10,26
Hoffmann, Heinz	10,12
Jagnjic, Ankica.....	10,3
Jareb, Ottmar.....	10,26
Jelenc, Pierre.....	10,22
Kalckhoff, Gerhard.....	10,21

Koolhoven, Wim	10,21
Krause, Erich-Dieter	10,7. 10,18
La Colla, Stefano	10,19
Le Puil, Jacques	10,8
Makkink, G.F.	7,6
Martin, Hugh	10,17
Maul, Stefan	6,2. 10,14
Maxwell, Dan	10,23
Michalski, Tadeusz J.	10,9
Mee, Laurence	7,5
Mi', Lorens > Mee, Laurence	
Minnaja, Carlo	10,2. 10,19
Munniksma	7,3
Neergaard, Paul	8,4
Okelmann, Franz	10,7
'O Mearáin, Breandán.....	10,17
Pabst, Bernhard.. 1,2. 2,1. 3,1. 4,1. 5,1	8,13. 9,1. 10,18
Pavlík, Marián.....	10,10
Pettyn	10,2
Pfeiffer, Daniel	10,21
Pflüger, Reinhard	8,7. 10,26
Pick, Antony C.	10,21
Pilger, W.F.	8,4
Piron, Claude.....	10,27
Pokrovskij, S.B.	10,20
Portmann, Doug . 6,2. 7,7. 8,6. 10,2,26	
Pospíšil, Jan	6,3. 10,4,11
Rotsaert, Roland	6,2. 7,4,8. 10,16
Schicke, Harald	10,12. 10,23
Schneider, Bodo.....	10,3
Schwarcaite, Ieva	10,17
Simon, Karl-Hermann	[6,2]. 10,16
Spitaels, Edward	6,1,2. 8,6. 10,28
Stollberg, Oskar.....	6,2. 10,23
Todorov, Angelo	10,15
Van de Brande.....	6,1
Vilborg, Ebbe.....	7,4. 10,10,11,24
Vinck-Collet, Jos,	6,2
Vogelmann, Bruno.....	7,4
Weichert, Martin	10,27
Welger, Helmut.....	8,14. 10,26
Wells, J.C.	10,7
Wennergren, Bertil	8,15
Werner, Jan.....	10,2. 10,12
Wiersch, Hans	7,9. 10,16
Wulff, Jürgen	7,7. 10,21,22,27,28
Yamasaki, Seikô.....	10,15. 10,26
Zamenhof, L.L.	7,6
Zlatnar, Svobodan	10,23

Indekso laŭtema de Terminoteko 1-10

La unua cifero indikas la kajero-numeron, la posta(j) la paĝo-numero(j).

La ckl. 1-2 aperis origine en formato A4 kaj poste estis ŝanĝitaj kaj aktualigitaj al formato A5. La indikoj referencas al la A5-versioj.

Afrikansa..... 5,1
AIS..... 8,9
Akademio de Esperanto 10,2
AMIGA-komputoroj 8,7
Analiza Skolo..... 10,26
Angla 1,1. 2,1. 3,1. 5,1. 7,3
..... 8,4,6,8,10,12. 10,7,9,10,14,17
-ap/ 7,7
Araba 7,4. 10,9
Arizona 8,6
artikolo..... 7,6
Aŭstralazia 10,14
aŭtomobilista 10,14
bakado > kuir-arto
bildvortaro..... 7,4
birdoj > zoologio
botaniko 6,2. 8,4
brigo > ludoj
Bulgara 7,4
Ĉeĥa 7,4. 10,9,10,12,15
Ĉina 7,3. 10,14
Ĉu terminika revuo kaj kia? 7,2
Dana 10,9
diakritoj 7,7
Egipta 7,4
"Ekofomo" > ekonomio
ekonomio 6,2. 7,3,8. 10,15,16
elektrotekniko 3,1. 6,1
Esperantologio..... 10,26
EŝLI > ŝako
etimologio 7,4. 10,11
Eŭska..... 10,16
fervojo 8,9. 10,11
Finna..... 10,9,11
flaŭro > botaniko
forsto-scienco 6,2. 10,16
Franca 7,3. 8,4. 10,8,9,10,11,14,17
frazologio 10,16
Fundamento de Eo 7,6

Gaela 10,17
geografio..... 5,1. 10,17
Germana..... 7,3. 8,4,7,10. 9,5
..... 10,7,9,11,12,14,16,17,18
Greka 10,9
Hebrea 7,4. 10,9
Hispana ... 7,3. 8,13. 10,9,11,14,17,18
historio..... 10,18
Hungara 7,4. 10,9
IFEF > fervojo
IKEF > ekonomio
IKEV 7,3
Indonesa..... 10,9
Itala..... 7,3. 10,9,17,18
Irana 7,4
-j/..... 7,2
Japana..... 7,3. 10,9,14
Jida..... 10,9
juro..... 6,2. 10,19
kemio 6,2. 7,7
Kmera 10,19
komerco > ekonomio
kompro > komputoro
komputoro
- kiel helpilo por terminaristoj
..... 4,1. 6,1. 7,7. 8,15. 10,9
- ~aj terminoj..... 7,7. 8,3. 10,20,21,22
> AMIGA-komputoroj,
> lernprogramoj,
> Mekintoŝ,
> programoj komputoraj
Kopta 7,4
kristanismo 6,2. 8,8
kuir-arto 2,1. 6,1. 8,13. 10,10
landnomoj..... 5,1. 7,2,5
Latva..... 10,17
lernprogramoj 8,7. 10,26,27
lingvo-observantoj 1,1. 6,1
Litova 10,17
ludoj 10,15
majuskloj 7,6,7. 8,2
Malagasa 10,4
matematiko 10,12
medicino 10,10,12,23
Mekintoŝ 10,3
NBN > zoologio
Nederlanda 7,3. 8,4. 10,9,14
neologismoj 7,6
Norvega 10,9
Pekoteko..... 6,1. 10,2,3

Per-Komputora Termino-Kolekto >	
Pekoteko	
PIV/PIVS.....	6,3. 10,26
plantoj > botaniko	
Plena Ilustrita Vortaro > PIV/PIVS	
Pola	7,4. 10,9,11,17
politiko	6,2. 10,14
Portugala	7,3. 10,9,14
programoj komputaraj	
.....	8,15. 10,27,28
psikologio.....	8,14. 10,23
REF > botaniko	
reto komputora	7,7. 10,27
Rumana	7,4. 10,9
Rusa	7,4. 10,9,11,14,17
Serbokroata	10,9
sindikatoj.....	7,9
sufiksoj.....	7,2
Slipara Vortaro.....	9,1
Slovena.....	10,23
stomatologio > medicino	
Svahila.....	10,9
Sveda	7,3. 10,9
ŝako	6,2. 8,15. 10,23
TEC.....	6,2. 8,15. 10,3
terminika periodaĵo	7,2
Terminologia Esperanto-Centro > TEC	
terminologia vortaro.....	10,14
termino-elekto.....	10,5
Turka	10,9
Vaska > Eŭska	
zoologio	6,2. 8,12

Recenzisto serĉata

Doug Portmann, Donald Rogers. Kemia kaj scienc-teknika vortaro. Eo - Angla - Germana. Naperville, Illinois [USA]: Doug Portmann. 1993, xxxiii + 297 p., la plej detala kemia terminaro de Esperanto meritas recenzon. Kiu fakulo pretas skribi ĝin?

La historia citaĵo

»Sinjoro Eugen Wüster ... serĉas por siaj ampleksaj lingvo-sciencaj laboroj ... kunlaborantojn, kiuj pretas, profunde kaj zorgeme esplori noveldonaĵojn de la Esperanto-literaturo laŭ neologismoj kaj aparte rimarkindaj parolturnoj.«

El: Germana Esperantisto **1926/11**, p. 207

Tiujn kunlaborantojn oni tiutempe nomis »substrekestoj«. Similaĵoj al la hodiaŭaj »lingvo-observantoj« estas pure ...

intencitaj.

enhavo

Elektronika Bibliografio.....	2
Registraĵoj de Pekoteko	7
Registraĵoj ekster Pekoteko....	8
lom pri Terminoteko	13
Reagoj de legantoj	14
Novaj terminaroj	18
Terminaraj projektoj	23
Korektoj.....	27
Kiu helpas	27
Venont-numere vi legos	28
Plant-vortaro, specimeno.....	29
Indekso laŭpersona ckl.1-10.	30
Indekso laŭfaka ckl. 1-10.....	31
Recenzisto serĉata.....	32
La historia citaĵo	32
Enhavo	32